

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

Feliĉan Novjaron 2022!

Karaj membroj kaj legantoj!

Venis la jaro 2022 – Esperplena ĉar la socia tumulto kaŭzita de KOVIM-19 fariĝis iom trankvila, kvankam ankoraŭ la risko je la viruso de omikra varianto kaŭzas maltrankvilon.

La agado de nia grupo nun kuras tute ĉirkaŭ la nova Esperanto-Muzeo Jokohama, funkcianta por niaj membroj kaj esperantistoj. La plena malfermo de la Muzeo estas planata en la baldaŭa aprilo, al la loĝantoj de Jokohamo kaj la tuta mondo.

En la 30a de januaro, ni havos jarkunvenon, traktos nian planon, buĝeton ktp. Tiu kunveno okazos en la Muzeo mem.



La 51a Zamenhof-Festo de Kanagavo (Gubernio Kanagawa)

La Festo por 4 Esperantaj Grupoj en nia gubernio okazis en la 12a de decembro 2021, duafoje tute interrete (per Zoom), zorgite de Esperanto-Societo de Kawasaki. Entute ĉ. 50 personoj aliĝis: el Jokohamo 14, kaj el ili 6 kune spektis en la Muzeo, per la granda ekrano, el Odawara 6 kune en unu ekrano, kaj ankaŭ el Kawasaki, 9 personoj per la sama ekrano. Unu estis el Huzisawa.

Je la 14a horo malfermiĝis la Festo, kaj krom la lastaj salutoj el aliaj grupoj, ĉio estis aranĝita de Kawasaki. Interalie, jenaj programeroj estis: kelkaj videe kaj kelkaj vive.

*Kial kaj kiel vi produktas veganan fromaĝon? de ges-roj Kawabata Yuto kaj Fanjo

*Pri la lastatempe eldonita novelo japanlingva por junuloj, en kiu Esperanto rolas, de Komatu Ayako, la verkinto.

*Pri Internacia Junulara Kongreso, de Toninho, la sola partopreninto el Japanio.

*Kantoj kaj dancoj de la Familio Takahasi-Tazima (la geedzoj kaj gefiloj).

*Raporto pri la 39a Komuna Seminario, de Nakaĵima Miki.

*Pri la agado de Celoj por Daŭripova Evoluigo (SDGs), ktp.

La Jar-kajero 2021a de Nefitocela Organizo Esperanto Jokohama

Sibayama Zyun'iti, la Redaktoro

Jen estas la skizo de la ĉefaj eventoj en 2021. noto: [MZ] estas por Esperanto-Muzeo Jokohama. Ne okazis eventoj aliloke, krom per [IR], t.e. per interreto.

(*2020, dec. 4) : aĉeto de la domo, nomita Esperanto-Muzeo Jokohama

(*2020. en dec.): aĉeto de tabloj, seĝoj, libroŝrankoj ktp, kaj aranĝado de tiuj mebloj

(*2020, dec. 19 [Mz]): provizora malfermo de la muzeo al la rondanoj

*en januaro [MZ]: Okazis la reformo de la muzea domo, nome japanstila ĉambro kun tatamoj en la unua etaĝo fariĝis eŭropstila lignoplanka ĉambro, por ke la tuta unua etaĝo estu uzbla por ekspoziciado de libroj.

*feb. 28 [MZ]: la Jarkunveno de nia rondo

*mar. 5 [IR] la 121-a Legokunsido, por "Kiu semas plorante..."

*en marto [MZ]: Grandaj ŝildoj de la Muzeo estis muntitaj sur la eksteraj muroj.

*apr. 23 [MZ]: oficiala fondotago de la Muzeo, 5 jarojn post la oficiala fondo de la Nefitocela Organizo Esperanto Jokohama. Ekspoziciita estas la unuaj lingvolernolibroj, kolektitaj pere de esperantista kunlaboro.

*apr. 25 [MZ]: Fondo-evento de la Muzeo, al esperantistoj (ankoraŭ ne al la loĝantoj). Ne estis apartaj eventaĵoj, sed kelkaj vizitantoj e-istaj trarigardis la Muzeon.

*maj. 5 [IR]: Aparta retpaĝo por la Muzeo estis malfermita, apud la jam ekzistanta paĝo por la NPO.

*en junio [MZ]: La emblemo de la Muzeo estis fiksita.

*jun. 12 kaj 13 [MZ/IR]: Okaze de la 70a Kongreso de Kanto-aj Esperantistoj (por regiono ĉirkaŭ Tokio, inkluzive nin), la Muzeo estis vive prezentita per Zoom-kanalo al la kongresanoj, kiuj rigardis aŭ en la kunvenejo aŭ per Zoom.

*jul. 17, 22, 23 kaj 24 [MZ/IR]: Okaze de la 2a Virtuala Kongreso (VK, anstataŭ ĉeesta UK), la Muzeo estas prezentita per Zoom, ne vive, sed per klarigaj bildoj.

*sept. 3 [IR]: la 122-a Legokunsido, de libroj elektitaj de la partoprenantoj.

*sept. 20 [MZ/IR]: Okaze de la 108a Japana Esperanto-Kongreso, tute per reto, estis viva elsendo pri la libroj rilataj al la atombombado en Japanio (en 1945, de Usono). La libroj kolektitaj de Hirosima-anoj estas aranĝitaj en nia Muzeo, kaj pri ili komentis Sibayama Zyun'iti al la kongresanoj rete partoprenintaj.



*nov. 14 [MZ/IR] : Okaze de la 39a Komuna Seminario inter Ĉina, Japana, Korea kaj Vjetnama Junularoj (KS), teamanoj de la KS vizitis la muzeon por intervjui, kaj la intervjuitaj scenoj estis videe sendataj al la seminarianoj.

*dec. 12 [IR]: La 51a Zamenhof-Festo de Kanagawa okazis rete sub la gvido de la Esperanto-Societo de Kawasaki. Entute 50 partoprenantoj, el kiuj 14 el nia Jokohamo. Inter la jokohamaj partoprenantoj, 6 kune spektis en la Muzeo. Jokohama-anoj en la fino salutis la festantojn.

La knaboj de Jakoo (3) (矢向の少年たち)

Tanigaŭa Hiroŝi

Kristnaska Koncerto por streĉiĝi en enirekzameno

Iam antaŭe en multaj mezlernejoj lernantoj furiozis aŭ malhelpis lecionojn. Kaj baldaŭ poste tia furiozo en lernejoj mildiĝis tutlande. Sed restis ankoraŭ furiozaj lernejoj ĉefe en urbegoj. En la finaj jaroj de la 20a jarcento Mezlernejo Jakoo en Jokohamo estis unu el tiaj esceptoj.

Ankaŭ en Aktiva Centro de Jakoo la knaboj ĝenis nin laborantojn. Ili petole malhelpis la vizitantojn de la domo. Se ni rigore kontaktiĝus kun ili, ili emus draste rezisti, aŭ rompus aĵojn ekster niaj okuloj. Malfacilege estis ekvilibre pritrakti ilin.

Rilate tion, mi starigis du principojn:

① Ni komprenu ilian malĝojon pro la fremdeco de la lernejo. Ili ne havas sian lokon en la lernejo.

② Ni konfidu tion, ke ili konservas profunde en sia sino naivan, homecan senson.

Plej gravas entute amo kaj pacienco, mi ripetis al la stabanoj. La ama kontaktiĝo de niaj stabanoj sentigis la knabojn, mi konstatas.

En aprilo 1999, du lernantoj estis arestitaj kaj senditaj al La Klasifika Domo por Gejunuloj en Odaŭara por du semajnoj.

La afero ŝokegis la grupanojn. Knabo M.D., la grupa ĉefo alportis al mi skribaĵon kun la titolo "Niaj karegaj amikoj". Ĝi tekstis resume: "Mi nun ĉagreniĝas. Mi vidis la instruistojn vendintaj siajn lernantojn al polico. Mi malamamis ilin tiom

flame, ke mi eĉ dezirus mortigi ilin. Sed mi pensis, ke helpi miajn amikojn restariĝi pli gravas ol malami instruistaĉojn. Mi multe lernis de miaj amikoj kaj de la instruistoj. Mi eksciis la severecon de maturuloj. Mi ankaŭ pentas. Kaj pli ol ĉio, karegaj estas niaj amikoj. Ni estos amikoj ĝis la postmorto."

Iun tagon en decembro 1999 la knaboj venis al ni kaj petis nin, ke ni permesu okazigi ilian koncerton ĉe la gimnastikejo de nia domo. Mi akceptis tion kondiĉe, ke ili starigu Organizan Komitaton, unu el kies membroj estu reprezentanto de iliaj gepatroj. Mi postulis ankaŭ anticipe elmeti detalan projekton.

Mi miregis leginte en la projekto vortojn:

La celo: Por streĉiĝi en la enirekzameno

Ili okazigis la koncerton en la 24a de decembro tre sukcese kun iom pli ol cent aŭskultantoj inkluzive de siaj gepatroj.

Kaj plue surprize ili igis la koncerton bonfara. La ofermono sumis 13 422 enojn.

Tri tagojn poste la knabo M.D. kaj 3 aliaj organizaj komitatanoj vizitis la Ĵurnalejon Kanagaŭa Ŝinbun (Mi akompanis ilin.) Ili oferis la kolektitan monon kiel ofermonon al "La Jarfina Reciproka Helpe de Kanagaŭa Ŝinbun".

Oni donis kvitancon kun dankvortoj al la knabo M.D., prezidanto de Organiza Komitato de Kristnaska Koncerto de Jakoo por Streĉiĝi en Enirekzameno. (fino)

Sub la pandemio

verkita en septembro, 2021

Hirai Isako

Aŭtunaj insektoj ekkantis anstataŭ cikadoj. Tio anoncas nin, ke la aŭtuno venas tuj proksime kaj atendas sian vicon. Sed en la komenco de septembro ni ne povos senti aŭtunon, kaj ankoraŭ devos vivi en varma vetero.

Tamen ĉu ni reale povos ĝui ĉi-aŭtunon? Infektiĝo de kronviruso pli kaj pli grandiĝas malgraŭ kontraŭrimedoj. Preskaŭ ni ĉiuj sekvas la registaran peton kaj restas hejme. Ĉu ne estas

aliaj rimedoj kontraŭ viruso? Ĉu la malfermo de la olimpikaj ludoj estas kialo de virusa disvastiĝo? Ne estas certa evidentaĵo, sed unu el la plej eblaj kaŭzoj, ĉu ne?

Kiam ni grandaĝuloj ankoraŭ ne havis vakcinon, mi telefonis al mia amikino, kiu heredas laboron de sia patro. Pasis longa tempo ekde kiam mi telefonis antaŭe. Babilante pri ĉiutagaj kaj bagatelaj aferoj, ŝi diris, "Mi iras

al kafejo najbara, kaj ankaŭ iras al kinejo, kiu situas en la centro de urbo Osako, Umeda.” Mi iomete surpriziĝis kaj diris, “Mi ne povas iri al tia loko per trajno. Survoje kaj trajne amasiĝas eblaj homoj, kiuj kaŝite havus kronan viruson, do mi tute timas.” Kontraŭe ŝi diris, ke ŝi prenas taksion. Aŭdinte ŝian diron, mi refoje surpriziĝis kaj ne povis elbuŝigi miajn vortojn. Honeste, kosto de taksio al tiu loko estos multekosta, ĉirkaŭ 3 500 enoj, kio estas tre ŝarĝa por mi.

Kompreneble la valoro de aferoj ne estas mezurata nur per mono, kaj tio dependas de pensmaniero kaj filozofio de tiu persono. Eble por ŝi tiuj kondutoj estas ŝiaj vivstiloj, kiujn ŝi tenadis ĝis nun. Ah, ĉu ŝi estas kuraĝa homo, kontraŭe mi estas malkuraĝa? Jes, mi estus malkuraĝa. Sed mi estas mi, ne la alia. Ŝajnas al mi, ke tiu pandemio ankoraŭ daŭros longe, kaj

en tiu situacio mi volas amuzi ĉi tiun aŭtunon eĉ en limigitaj cirkonstancoj, ne vizitante kafejojn, kinejojn kaj aliajn amuzlokojn ktp. Plie estis donata al mi la bonŝanco por rete lerni Esperanton.

Mia ĉiutaga mondo estas malgranda, nome najbaraj superbazaro, biblioteko, librovendejo ktp. Al la biblioteko mi iras por ricevi rete rezervitajn librojn, kaj du aŭ tri fojojn monate mi iras al tiu librovendejo, kiu vendas malkare brokantajn librojn. Hazarde mi renkontas tian libron, kiu donas etan amuzon. Foje, piedirante straton, mi rigardas ĉirkaŭon, kie arboj, etaj floroj kaj trudherboj montras siajn diversajn ŝanĝojn, ekzemple belaj koloroj, specoj de floroj, ktp. “Iam tiu pandemio nepre finiĝos”, kion mi tute esperas same kiel multaj homoj. Estas neniu tunelo sen elirejo.

Radio 3ZZZ legis niajn artikolojn

elsendo de la 28a de junio 2021

Novaĵoj Tamtamas numero 364 “Homojn, kiujn mi renkontas en mia matena promenado” de Aida Yayoi.

elsendo de la 13a de septembro 2021

el Novaĵoj Tamtamas numero 365 “Jen la objekto” de Mizro Iwaya

elsendo de la 13a de decembro 2021

el Novaĵoj Tamtamas numero 368 “Ĉu pago senkontanta resanigus mian ŝultron?” de Namba Fumiharu

elsendo de la 27a de decembro 2021

el Novaĵoj Tamtamas numero 368 “Ne plu kazino en Jokohamo” de Sibayama Zyun’iti

EL NIA MUZEO

— kio estis, kiel estas en Esperanto-Muzeo Jokohama —

Vizito de studanto

Plurajn fojojn vizitis la Muzeon s-ino Kamimura Kazumi, vicprofesoro de la Universitato Josai [zyoosai] en Gubernio Saitama. Ŝi studas i.a. proletarisman literaturon antaŭ la Dua Mondomilito en Japanio, inkluzive de la proletarisma Esperanto-movado. Serĉante materialon por sia studo, ŝi kontaktis nin, kaj trovis ĉe ni valorajn dokumentojn kolektitajn, ŝi vizitis por pli detale trakti la dokumentojn.

Miyazawa Kenzi kolektitaj

Miyazawa Kenzi (1896-1933) estis japana fabelisto-poeto, lernis Esperanton, verkis tre malmulte en Esperanto --- sed kiel ŝatata fabelisto, multaj el liaj verkoj estis poste tradukitaj en Esperanton. Aliflanke, li fariĝis celo de literatur-kritikado, en kiu ofte oni mencias pri lia inklino al Esperanto. Tial, nia kolekto pri Miyazawa Kenzi estas duflanka. (1) liaj verkoj esperanten tradukitaj, (2) literatura kritiko aŭ mencioj pri li, tuŝanta lian emon al Esperanto. Ĉar li estas bone konata homo en Japanio, la kolektitaj materialoj nun kuŝas en la unua etaĝo, tre proksime al la enirpordo al la Muzeo, por esti facile spekteblaj.